

I. F. E. A.



ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIERI ESPERANTISTI

Aderente alla INTERNACIA FEDERACIO ESPERANTISTA FERVOJISTA (I.F.E.F.);
alla UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO (U.E.A.) e alla FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA (F.E.I.)
Sede Centrale: Dopolavoro Ferroviario - Piazza Calderini 4 - Bologna (Italia)



Informal Bulteno

ITALA FERVOJISTA ESPERANTO - ASOCIO

REDAKTEJO: Bologna - Via Donato Creti N. 61 - Tel. 59-071

REDAKTORO: Gimelli p. l. Germano

N°10 - 11 - 12 Julio, Aŭgŭsto kaj Septembro 1955

POST NIA KONGRESO EN ZÜRICH

PROTOKOLO PRI LA KUNVENO DE LA TERMINARA KOMITATO

Ĉi tiu bone vizitata kunveno okazis lundon la 9-an de majo je la 16.30-a horo en Limmathaus, Zurich.

Liaŭ deziro de la ĉeestantoj, ĉefestrarano De Jong prezidas la kunvenon. En mallonga enkonduka parolado li bonvenigas la gekolegajn kaj skizas la nunan staton de la priterminara laboro jene:

Post la ekziĝo de s-ro Pape mankas iu ĝenerale gvidanto por la komitato, kaj ŝajnas malfacile persvadi la malmultajn kompetentulojn en nia propra rondo okupi la vakan lokon. La tasko estas tro temporaba kaj postulas krom profundan lingvokapablecon ankaŭ vastan scion pri la fervoja tekniko en ĉiuj siaj nuancoj. Nia organizo estas ankoraŭ juna kaj tiaj spertuloj ne jam abundas en ĝi. Entuziasmo ofte devas anstataŭi la mankon pri sperto. Sed entuziasmo, kvankam nepre necesa, ne ĉiam sufiĉas por la bona plenumado de la laboroj, precipe kiam temas pri la malfacila tasko kiun prenis sur sin la anoj de la terminara Komitato. Ofte ili bezonas helpon kaj konsilon de eminentuloj el la ĝenerala movado. Estas la granda merito de s-ro Blondeax, ke li neniam hezitis peti konsilojn de samideanoj havantaj multjarana sperton en lingvaj kaj fervoj-tekikaj aferoj.

Malgraŭ tio, ke li ne povis akcepti la gvidan taskon en la komitato s-ro Blondeaux grave stimulis la laboron en la pasinta jaro, kaj pro tio li meritas nian koran dankon.

En ĉi tiu kunveno ni klopodas trovi novan gvidanton por T.K. kaj poste ni decidu ĉu daŭrigi, ĉu provizore interrompi la terminaran laboron. Por ke ni estu bone informitaj pri la jam farita kaj ankoraŭ farota laboro ni volonte aŭskultas une iun ĝeneralan superrigardon de s-ro Blondeaux kaj poste la raportojn de kunlaborantoj el la diversaj landoj.

Blondeaux esprimas dankon al la pioniroj Robick Rosher pri la grava helpe kiun li spertis de tiuj samideanoj.

Post la kongreso en Utrecht la francoj daŭrigis la laboron, Fraŭlino Lemonnier petis al la franca fervojo administracio permeson traduki la "LEXIQUE TECHNIQUE FERROVIARIE" kaj kun la jusa respondo ŝi ricevis la sciigon, ke la franca fervojo S.N.C.F. intencas eldoni novan Terminaron 5 - lingvan. Ili konsideras la eblon aldoni al tiuj lingvoj ankoraŭ Esperanton, kaj se efektiviĝos tiu plano, ili petos por la bona plenumado la kunlaboro de IFEF.

Ĉi tiu favora respondo, kaj ankaŭ la brila venko de Esperanto en Montevideo devas stimuli nin por la obstino daŭrigi nian laboron.

Kiel pruvon de la senlaca laborado de la francoj li prezentas la tradukon de 5000 vortoj el LEXIQUE TECHNIQUE FERROVIARIE kaj li esperas ke ankaŭ la aliaj landoj plenumis la taskon akceptitan en Verona.

Prezidanto De Jong kore dankas Blondeaux kaj ĉiujn liajn helpantojn pro la giganta laboro kiun ili faris. La ampleksa kaj bela kajero kun 5'000 terminoj, kiun pretigis la francoj, estas pruvo de laboreno kaj kapablo pri kiuj nia movado povas fieri.

Li donas la parolon al la aliaj landaj delegitoj por raporti pri la laboro farita en la pasinta jaro.

Christoffersem (Danio) sciigas ke la danoj tradukis kelkajn partojn pri lokomotivoj el la vortaro de Roŝher. La dua parto estas preta, sed poste la afero stagnis, ĉar ili vane atendis la menditan kajeron el Francio.

Hogendijk (Nederlando) tradukis la 1-an kaj 2-an ĉapitron el la vortaro de Roŝher. Li plendas ke tute sola li devis fari tiun laboron, ĉar la nederlanda gvidanto ne estas aktiva, kaj fine sciigas ke li ne povas daŭrigi la laboron.

La prezidanto de la nederlanda fervojista rondo interrilatis kun la gvidanto, sed ricevis respondon nur du semajnojn antaŭ la kongreso; tro malfrue por entrepreni ion favore al pli bona progreso de la afero.

Kvankam li ne estas ano de la T.K., s-ro Labordus penas daŭrigi la laboron, kaj li promesas, ke li klopodos trovi kun laborontojn, por ke Nederlando en la Stokholma kongreso povu prezenti iun terminaron Esperanto-Nederlandan.

Ohlson (Svedio) estis devigata prokrasti la laboron pro longdaŭra malsano. Sed jam la tasko progresas, kaj li promesas, ke en Stokholma kongreso estos preta la terminaro Esperanto-Sveda.

Simon (Germanio) laŭdas la laboron de Blondeaux, ĉar li nen spertis kiom temporaba estas la laboro. La scio, ke la pretigo de kompleta fervoja terminaro postulos multajn jarojn ne tirigu nin, nek brensu nian entuziasmon. En la tuta Mondo ne ekzistas kompleta teknika vortaro. Li daŭrigos la laboron, sed ne povas akcepti la ĝeneralan gvidadon, kiun taskon li volonte asignus al Blondeaux.

Kiel pruvon de ofika laborado en Germanio, li prezentas la Germanan tradukon de la vortaro de Roŝher aperinta en la jarlibro de U.E.A. 1952.

Blondeaux parolanta por la franca rondo rinarkas ke efektive la prestiĝo de fervoja terminaro postulas multajn jarojn. Post la streĉa laborado de la pasinta jaro li bezonas ĵon da ripozo, tial li nepre ne povas akcepti la gvidadon de la nunjare farotaj laboroj. Estis tre malfacile trovi en propra rondo kompetentulojn por helpi en la laboroj, kaj tial li volonte akceptis la helpon de ne-esperantistoj. La franca rondo elspezis por la afero jam 30'000 frankojn. Malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj, ili akcente konsilas daŭrigi la laboron.

La prezidanto ĝojas ka ankaŭ la germanaj komitatanoj prezentis en ĉi tiu kunveno iun konkretan rezultaton de ilia laboro. Li kore dankas s-ro Simon kaj liajn helpantojn pro tio ili faris. Cetero ankaŭ la aliaj kunlaborantoj meritas dankon, ĉar ili sendube laboris laŭpove. Li bedaŭras, ke ankoraŭ neniu anoncis sin por gvidi la komitaton. Malgraŭ tio, pluraj landoj esprimis la deziron daŭrigi la laboron. Tial li proponas, ke la landoj en kiuj la afero ion stagnis, prezentu en la venontjara kongreso la tradukon de la vortaro de Roŝher kaj serobe ĉiuj landoj traduku la esperanta-terminojn el la kajero ĵus prezentita de la francoj. En la kongreso en Stokholmo ni decidu, ĉu ni povos tamen daŭrigi la laboron sen iu ĝenerala gvidanto.

Post kian ĉiuj ĉeestantoj aklande akceptis la proponitan taskon, prezidanto De Jong fermas la kunvenon je la 18-a horo kun kelkaj instigaj vortoj.

ŜANĜO PRI BULTENO

La estraro de I.F.E.F. decidis ĉijare aperigi "Bulteno de la I.F.E.F." en la monatoj: Junio, Aŭgusto, oktobro, Decembro, Februaro kaj Aprilo.

Ĝis nun ĝi aperis en Majo, Julio, Septembro, Novembro, Januaro kaj Marto.

FERVOJISTA RENKONTIĜO EN SAARBRÜCKEN

De la 14-a ĝis la 16-a de majo renkontiĝis fervojistoj el diversaj eŭropaj landoj en Homburg kaj Saarbrücken. Parolis en la malforno reprezentantoj registara urbo, sindikato, esperanto-organizaĵoj kaj kelkaj fervojistaj delegitojesperantistaj. La prezidanto de I.F.E.F., Stapel salutis la ĉeestantojn.

Dimanĉon okazis Esperanta diservo, celebrita de dekano Bergweiler Vespere kunvenis en Homburg esperantistoj kaj neesperantistoj por diskuti Landon la urbo Saarbrücken akceptis kaj regalis la partoprenantojn. Sekvis tri prelegoj de Danio, Francio kaj Jugoslavio pri la temo "La lukto de la fervojoj kontraŭ la strattrafiko".

40-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
BOLOGNA - ITALUJO

KONGRESA REZOLUCIO

La 40-a Universala Kongreso de Esperanto, okazanta en Bologna de la 30-a de Julio ĝis la 7-a de Aŭgusto 1955, en ĉeesto de 1700 reprezentantoj el 30 landoj, unuanime:

- 1) kun ĝojo konstatas, ke la Ĝeneva Konferenco de la kvar ŝtatestroj iniciatis malstreĉigon de la internacia tensio kaj esperas ke tiu komenco estas sekvota de pozitivaj rezultoj precipe sur la kampo de pli bona kompreniĝo kaj proksimiĝo inter la larĝaj popoltavoloj de ĉiuj nacioj de la mondo;
- 2) esprimas sian kontenton pro la Rezolucio de la 10-a de Decembro 1954, per kiu la Ĝenerala Konferenco de U.N.E.S.C.O. objektive rekonis, ke la Internacia Lingvo Esperanto kontribuis al internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj al monda paco, kaj ke ĝiaj atingaĵoj respondas al celoj kaj idealoj de U.N.E.S.C.O.;
- 3) atentigas, ke ĉiu sincera klopodo proksimigi la popolojn, krei spiriton de reciproka toleremo kaj fermi veran internacian solidarecon ne povas neglekti tian potencon instrumenton de internacia komunikado kia estis la Internacia Lingvo Esperanto kaj tial

a) apelacias al naciaj kompetentaj instancoj doni sian apogon al disvastigo de Esperanto, tute speciale per helpo al starigo aŭ restarigo de la Esperanto-organizaĵoj en tiuj landoj, kie tiaj pro diversaj kaŭzoj nuntempe ne ekzistas;

b) petas la Registarojn de ĉiuj ŝtatoj profunde studi la eblecojn enkonduki Esperanton en la lernejojn prefere surbaze de Internacia Konvencio, kiu fiksas la detalojn rilate la studon en diversaj landoj samtempe;

c) notas kun aprobo, ke la urbestroj de Bologna kaj Boulogne-sur-Mer dum la Kongreso solene ĝemeligis siajn urbojn per Esperanto kaj esperas, ke multaj aliaj urboj sekvos tiun ĉi ekzemplon;

d) turnas sin al ĉiuj, kiuj aspiras pli grandan unuecon de la mondo kun la alvoko ellerni la Internacian Lingvon kaj vaste praktiki ĝin en la internaciaj rilatoj.

PUBLIKA AFIŜO DE LA KOMUNUMO

Urbanoj!

Bologna gastigas de la 31-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto la 40-an Universalan Kongreson de Esperanto.

De Boulogne-sur-Mer, kie en la malproksima 1905 okazis la unua Kongreso, kulminas hodiaŭ en nia urbo la jubileo de ĉi tiu ideo kiu - kongregita en la parolo - havis en Ludoviko L. Zamenhof sian plej geniam pledanton.

Bolonjanoj!

Al tre bonvenaj gastoj kiuj ĉi tie kunvenas el ĉiuj partoj de la mondo iru la kora saluto de nia urbo kune kun la sincera bondeziro ke la idealoj de frateco kaj de unuiĝo inter la popoloj, kiujn esperanto entenas en la simbolo de la kvinpinta verda stelo, trovi ĉiam pli firman kaj laŭcelan efektivigon por la plifirmiĝo de la paco kaj de la amikeco inter la homoj de la tuta mondo.

Bolonjo, 30-an de Julio 1955

LA KOMUNUMA MAGISTRATO

INAUGURO-DIMANĈON, LA 31-an DE JULIO

Parolante esperanton la urbestro de Bologna, Dozza, solene inaŭguris la 40-an jubilean kongreson de Esperanto. Ien la resumo de la parolado:

Antaŭ ĉio, la oratoro esprimis sian dankon plej koran al la organizintoj pro la fakto ke ili elektis la emilian ĉefurbon kiel sidejon de la kongreso. Jam de la nacia itala esperanto-kongreso en 1952, la urba konsilantaro de Bologna ĉiam helpis

"Kiel la mortintoj povas helpi al la vivantoj". La oratore skizis la historion de la uzado de la homaj kadavroj por sciencaj celoj kaj montris kiam fundamentamhelpon tiuj mortintoj alportis al la evoluado de la anatomiaj konoj, kaj konsekvence ankaŭ de la fiziologio, de la patologio kaj de la aliaj branĉoj de la medicino. Se nuntempe novaj eblecoj prezentigas pri la uzado de la kadavroj; tio estas la alprenado el ili de pecoj per la greftaj operacioj, inter kiuj la transplantado de la korneo jam atingis grandajn praktikajn rezultojn. Por tiu uzado de la kadavroj necesas novaj leĝoj, ĉar per la nunaj ĝi ne estas permesata.

Sed la problemoj ne estas nur leĝaj, sed anksu morala kaj postulas novan orientigon de la ĝenerala pensmaniero pri la kadavroj, kiun la oratore klarigis kaj auspicias.

Sekvis al la mikrofono Prof. Ivo Lappenna kiu parolis pri la temo:

"La Europa konsilantaro kaj la ideo de Europa Federacio". La oratore interesiĝis pri la plej nova historio de Europo, kaj trafe ekzamenis ĉiujn problemojn kunligitajn kun la politika evoluo de la Europaj ŝtatoj. Post tiu interesa travigado tra nuntempa situacio en nia kontinento, Prof. Lappenna klarigis la historian bazon sur la kiu oni komencis antaŭ ne longe konstrui projektojn kaj aktualajn realigojn per Europa komuna registraro. De tiu la fondiĝo, la celoj kaj strukturoj de la Europa konsilantaro. Aliaj tre aktualaj problemoj prezentigas post tiu starigo de Europa estraro: la plej famkonataj eĉ de ordinara publiko estas ekonomia kunlaborado (karboŝtala unio) kaj milita unuiĝo (europa armeo). Finale oratore konkludis ke nur plena, efektiva reala unuiĝo je formo de federacio povas esti la plej bona solvo de la nuntempaj malfacilaĵoj en ĉiuj internaciaj interrilatoj.

GEJUNULA SOCIALA VESPERO

Samtempe dum la malfermo de la internaciamora universitato, en dancejo okazis la jam anoncita gejunula sociala vespero, En la ejo de la balo orkestro kaj gekantistoj amuzis la multnombrajn ĉeestantojn kaj ĝis noktomezo oni dancis en libera aĉero.

Dimanĉon la 31-an de Julio okazis la evangelia diservo en la en la metodista preĝejo.

Predikisto estis Pastoro R. Hoppe el Germanujo. Pli ol 3/4 de la preĝejo estis estis okupitaj kaj post la kantoj kaj prediko oni kolektis monon duonparte por la Bolonja evangelia eklezio kaj por la kazo de blinduloj esperantistoj.

R A D I O R O M A
ESPERANTO

Dissendoj en Esperanto
Jaro 1955.a

Casella postale 320
R O M A (Italia)

La dissendoj okazas de h. 19,10 ĝis h. 19,25 (Laŭ M.E.T.)
Stacioj: m. 31,33 = Mc/s. 9,57 kaj m. 49,92 = Mc/s. 6,01

Prelegas: merkredo -S.ro Luigi NINNAJA
" vendredo -Prof.D.ro Vincenzo MUSELLA

SEPTEMBRO

- 544 vendredon la 2.an - La fortepiano kaj ĝia eltrovinto- Bartolomeo Cristofori
- 545 merkredon la 7.an - Mondo Esperantista
- 546 vendredon la 9.an - Giovanni Pascoli en la jarcento de lia naskiĝtago (1855-1912)
Prelego farita en la somera Universitato 1955.a
- 547 merkredon la 14.an- Novaĵoj el Italujo
- 548 Vendredon la 16.an- La Itala Renesanco - Kultura prelego farita dum Bolonja Kongreso

- 549 merkredon la 21.an - Junularkunveno ekskurso al Scanno kaj al Nacia Parke de
Abruzzo
550 vendredon la 23.an - La grandaj italaj pentristoj : "il Beato Angelico"
551 merkredon la 28.an - Verdesto gastigoma esperantisto (skeĉo ludita ĉe la 11.a
Junulara kunveno)
552 vendredon la 30.an - Leterkesto kaj bibliografio

=====
OKTOBRO
=====

- 553 merkredon la 5. an - Mondo Esperantista
554 vendredon la 7. an - 25.a Internacia Kongreso de la blindaj esperantistoj
555 merkredon la 12.an - Novaĵoj el Italujo
556 vendredon la 14.an - Cristoforo Colombo okaze de la datoveno de la malkovro
de Ameriko
557 merkredon la 19.an - Internacia festivalo de la kanzono okazinta en Venecio
558 vendredon la 21.an - Italaj urboj: Cagliari
559 merkredon la 26.an - "Ĉe l'akvo de l'forgeso" dramato de Marjorie Boulton gajnita
la 1. an premion en la Belartaj Konkursoj 1955.a
560 vendredon la 28.an - Leterkesto kaj bibliografio.

=====
La faktestro: B L A S I M M E

ITALIA FERVOJISTO ESPERANTO -ASOCIO

V° Congresso Nazionale Bologna 9 Ottobre 1955

Domenica 9 Ottobre 1955 avrà luogo a BOLOGNA presso la Sede del Dopolavoro Ferroviario, Piazza Calderini 4 I° Piano, il V° Congresso Nazionale Ferrovieri Esperantisti.

Mentre facciamo appello a tutti i nostri associati, liberi dal servizio di essere presenti, comunichiamo che al Congresso sono invitati a parteciparvi anche i samideani Bolognesi e dei gruppi Esperantisti delle Città vicine, nonché rappresentanti delle Associazioni Nazionali Ferrovieri Esperantisti aderenti alla I.F.E.F.

Come per l'anno scorso e contrariamente a quanto è avvenuto nei precedenti nostri Congressi, quest'anno non ci è stato possibile affiancare il nostro Congresso al Congresso Nazionale della F.E.I. che ha avuto luogo nel quadro del 40° Congresso Universale di Bologna.

ORDINE DEL GIORNO

- 1) - Relazione e proposte del Presidente
- 2) - Relazione del Cassiere
- 3) - Eventuali e vario

IL PRESIDENTE DELL'I F E A
(Cav. G. Zacconi)

PROGRAMMA

Domenica 9 Ottobre 1955

Mattinata - Arrivo dei Congressisti - (Samideani Bolognesi saranno in stazione per ricevere i congressisti nell'atrio Arrivi)

ore 11 - Apertura del Congresso e continuazione dei lavori fino ad esaurimento dell'O.d.G. (presso il D.L.F. in Piazza Calderini 4 I°-Piano)

Ore 13 - Pranzo in comune (Presso la mensa del D.L.F. in Via del Cane nei pressi della sede del D.L.F.)

Pomeriggi - Eventuale visita alla Città ed al Santuario di S. Luca a secondo il desiderio dei Congressisti che verranno accompagnati da Samideani Bolognesi. Il Programma del Congresso è stato limitato al minimo indispensabile per permettere ai Samideani di non intaccare le ferie per parteciparvi e fare in modo di raggiungere Bologna in mattinata direttamente dalle loro sedi e farvi ritorno in serata.